Saluton.

Mi kandidatiĝas por la Estraro de TEJO por **1-jara periodo 2023-2024**.
Pro mia aĝo mi povas esti nur en sekvaj 2 Estraroj. En la 2024-2025 mi eble eĉ kandidatiĝus por alia ofico (se mi havos sufiĉojn da tempo kaj frenezeco).

**Motivigo**:
Esperanton mi konsideras esti tre bona ilo por unuigo kaj pacigo de homaro. Mi ne estas sufiĉe naiva por kredi, ke Esperanto mem tion faros, sed laŭ mi ĝi estas unu el pecetoj, kiuj direktos homaron al tiu pado.

Por Esperanto mi agadas jam dum duono de mia vivo en diversaj roloj, funkcioj kaj organizoj. Kiel delonga komitatano A de TEJO (foje eĉ duobla :) mi konsideris kandidatiĝi por Estraro de TEJO pli-malpli ĉiam ekde 2015 (Roĉjo eble memoras pri nia tiatema diskuto dum IJK en Vizbadeno). Ĉiam mi decidis ne fari tion pro diversaj kialoj - unue mi iĝis volontulo, poste oficisto, poste mi bezonis enordigi mian personan vivon kaj fine komencigi la organizon Vikimedio EO, kiun mi fondis kaj starigas elde nulo kun helpo de aliaj aktivuloj. Lastan jaron mi jam vere forte pripensis kandidatiĝi, sed post multa cerbumado kaj diskutoj mi konstatis, ke plejprobable mi ne havos sufiĉan tempon en tiu jaro. Tio montriĝis tute vera - dum lasta jaro mi havis apenaŭ tempon por spiri kaj tio iom malpli forte daŭros ĝis fino de ĉi-jara Aŭgusto. Mi tamen antaŭvidas, ke ekde oktobro mi estos denove pli libera kaj povos dediĉi koncentritan atenton por volontula laboro.

Nun mi estas en lastaj 2 jaroj de TEJO-aĝo. Ankaŭ TEJO mem multon investis en mian disvolviĝon, ekz. dum trejnadoj, rabatoj ĉe aganĝoj kaj (tre grave) volontulado. Laŭ mi, mia partopreno en la Estraro estas bonega maniero por samtempe helpi al disvolviĝo de TEJO kaj Esperantujo kaj ankaŭ por redoni tion, kion mi ricevis. Kaj jen, tial mia kandidatiĝo.

Miaj preferataj **oficoj**: **simpla estrarano** kaj **vicprezidanto**.
Nun mi certe ne prenos oficon Prezidanto (tiom multajn tempon kaj atenton mi ne havas), la Ĝenerala Sekretario (mi eble estas ĝena kaj seka, sed alimaniere :), la Kasisto (financoj vere ne estas mia fako kaj mi volas, ke tie estu vera spertulo). Mi estas tute enorda pri simpla estraraneco, sed depende de la fakoj kiujn mi prenos, vicprezidanteco povas esti utila (ekz. por rilatoj kun UEA).

Miaj preferataj **fakoj**:

- **Komisionoj**: Transnaciaj projektoj, Aktivula Trejnado / Talento (ni eble bezonas pli distingi aŭ kunigi tiujn ĉi komisionojn...), eventuale Kulturo
- **Interesgrupoj**: Teĥnologio
- **Respondecoj**: Rilatoj kun UEA, Volontuloj

La fakoj mi elektis precipe laŭ miaj spertoj kaj interesoj. Dum lastaj jaroj mi multe okupiĝas pri projektoj de Erasmsu+ kaj dum lasta jaro verkis kaj gvidas 2 projektojn, kaj nun (morgaŭ) komenciĝos plia. Do mi havas konojn pri la afero kaj eĉ plurfoje diskutas tiajn aferojn kun Karlos kun kiu mi havas bonan rilaton. Mi volas, ke TEJO sukcesu en kadroj kiel Erasmus+ ankaŭ ekster Eŭropo, sed sincere mi kredas, ke 1-jara mandato plej bone sukcesos nur prepari grundon por sekva Estraro, sed eĉ tio estus ege bona rezulto. Tutviva edukado estas ankaŭ mia hobio kaj fakte vivmisio (tion mi faras per la organizo Vikimedio EO, kiun mi fondis kaj gvidas). Do mi povas respondeci pri Aktivula trejnado kaj / aŭ Talento. Tie mi ŝatus, ke TEJO havu edukan programon almenaŭ por siaj ĉefaj aktivuloj (programaj volontuloj, estraranoj, eventuale komisiitoj), sed ankaŭ por ĝenerala

Esperantujo (la TEJO-Akademio estas laŭ mi bona paŝo en tiu direkto). Mi studis komputikon kaj multe laboras pri ĝi, uzas ĝin en Esperantujo kaj tiel vidas, ke ĝusta teĥniko kapablas bonege helpi al agado. Mi estis volontulo de TEJO kaj staĝanto de E@I, partoprenis nome de TEJO projekton VolADE ĝuste pri volontulado, kaj nun mi pasigis preskaŭ monaton observante volontulojn en EKC Tuluzo kaj TEJO. Do mi konas volontuladon en TEJO eble eĉ tro proksime. Tiun ĉi fakon mi volonte transprenus ankaŭ por plulerni kaj praktiki mastrumadon de longtempa stabo, kio al mi utilos estontece por mastrumi teamon de pagataj homoj. La Rilatojn kun UEA mi ŝatus transpreni ĉar mi jam havas bonajn rilatojn kun pluraj ĉefaj aktivuloj de UEA, do ni povus grandparte facile transsalti tiun komencan interkonan periodon kaj komenci labori. Mi konsideras estontece ankaŭ kandidatiĝi al Estraro de UEA, do tiu ĉi fako en la Estraro de TEJO povus esti tre bona paŝo en tiu direkto.
Kulturon mi metis nur eventuale, ĉar kvankam mi tre ŝatas kulturaĵojn kaj mem muzikumas, mi havas tre limigitan ideon kion la komisiono efektive povus fari. Mi ne ŝatas esti direktoro de fantomaro kaj ne tro spertas pri aktivigo de homgrupo, ĉe kiu mi ne havas klaran ideon pri eblaj agadoj...

Amike
KuboF Hromoslav (Michal Matúšov)